# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62 - CALAIS.

Informilo n-ro 4 Aŭgusto-Septembro-Oktobro 1966

Estimataj Gesamideanoj,

La NFEF elkore invitas vin honori per ĉeesto ĝian aŭtunan esperanto-renkontiĝon, kiu okazos en Valenciennes, la 9-a de oktobro; laŭ la jena programo :

9.45 h : Rendevuo ĉe la Urbodomo.
10.00 h : Malfermo de la laborkunsido en la (urbdoma) Salono Chatham.
12.00 h : Oficiala akcepto.
13.00 h : Komuna tagmanĝo ĉe "Viaduc", Place de Tournai (apud ponto Jacob). Prezo (pokape) : 12,50 FF (inkluzive la trinkaĵojn).

Menuo : Variaj antaŭmanĝoj - Rostita bovidaĵo - Terpomoj k sezonaj legomoj - Fromaĝo, glaciaĵo, kafo kaj postkafo.
Trinkaĵoj : unue : blanka alzaca vino Sylvaner;
poste : ruĝa bordeza vino Fronsac.

Loterio.

La partoprenontoj de la bankedo sin anoncu, se eble antaŭ la 1-a de oktobro al : S-ro Marcel LIGOT, 6, rue Dadier, 59 - Valenciennes (France).

Posttagmeze : Ekskurseto al ROEUX - ĉe la tiea urbodomo :
Vizito de ekspozicio de belegaj kolorfotoj pri Grésillon kaj la Loire-regiono (fotis S-anino F-ino TOMALIEJ).
Projekciado de diapozitivoj pri la U.K. de BUDAPESTO.

NEPRE ĈEESTU! VENU MULTNOMBRE!

Le federacia estraro.

## N I A V I V O.

CALAIS : Dimanĉe 3-an de aprilo, la Kaleza Kultura Centro Esperanto Kunvenis por diskuti pri la eventuala organizado de la nacia kongreso de U.F.E. 1967. Ankaŭ ĉe la tagordo staris la rilatoj kun la esperantista grupo de Duisburg, kiujn certigas S-ro DUCROCQ.

"Nord-Littoral" (kun foto), kaj "Nord-Matin" (marde 9-an de aŭg.) raportas pri la vizito de ĉeka esperantistino, F-ino Maria MRAZOVA, muzikprofesorino en Pilsen. Ŝi pasigis kelkajn tagojn ĉe ges-roj BUERICK, post vizito de la kastelo Grésillon kaj Parizo.

NACIA KONGRESO DE U.F.E. KALEZO - PENTEKOSTE 1967.

"Nord-Littoral" komunikas, ke la proks. kongreso de francaj esperantistoj okazos en Kalezo.

Gratulon al niaj kalezaj federacianoj, kiuj konsentis preni sur sin tiun gravan organizadon. Espereble, post tiu evento, la esperantista movado trovos novan impeton en nia regiono.

LA KALEZA KULTURA CENTRO ESPERANTO MERITAS SIAN NOMON!

"La Voix du Nord" (12-8-66) sciigas, ke, dank' al esperanto, klerulo, kiu plenumas historian esploron sukcesis solvi problemon - kion, ĝis nun, li vane provis. Ricevinte leteron el la Praga Historia Instituto, li turnis sin al la lokaj esperantistoj, kiuj kunlabore kun F-ino Maria MRAZOVA havigis al li la taŭgan tradukon.

### NASKIĜO :

OISEMONT : La 19-a de aŭgusto 1966 naskiĝis en Amiens Isabelle, filino de niaj geamikoj Ges-roj Jean HENIN. Koran gratulon al la feliĉaj gepatroj! Adreso : 10, rue de la Gare, 80 - OISEMONT.

### Kastelo GRESILLON :

Dum la somerferioj, restadis en la franca esperanto-kulturdomo kelkaj nordfederacianoj, i.a. : Ges-roj BOURGOIS Lucien, CNUDDE, GILOTEAUX, JOLY, LEGROS, k F-ino LENEL.

### UEA-propono al Uno :

Nord-Matin sciigas, ke inter la subskribintoj de la propono por apogo k disvastigo de esperanto troviĝas jenaj eminentuloj :

François MITTERAND, Guy MOLLET, Walter HALLSTEIN, Jean ROSTAND kaj Maurice GENEVOIX.

### Filmo-Foto Amatoroj :

Aperas faka bulteno : "Verda Film-Strio", okpaĝa, mimeografita. Abonprezo por 4 sinsekvaj n-roj : 4 internaciaj respondkuponoj. Reprezentanto serĉata en Francujo.

La koncerna bulteno estas mendebla ĉe : "Verda Film-Strio",
P.O. BOX 32, MT WAVERLEY (Victoria), Aŭstralio.

Turismo - S-ro CONTART, emerita lernejestro, deziras organizi turisman fakon en Francujo. Li deziras nur helpi sekretarion. Kiu bonvolos sin anonci?

Kandidatoj skribu al : S-ro CONTART, Directeur d'Ecole Honoraire, Route Nationale, 62 - NORRENT-FONTES.

## LA GAZETARO KAJ NI.

"POSTES ET TÉLÉCOMMUNICATIONS" : La aperigo en esperanto de artikolo de hungara korespondanto en la organo de Francaj Poŝtistoj vekis viglan polemikon. La lasta artikolo, kiu fermis tiun diskuton, aperis en la n-ro 127 (julio 1966), de sub la plumo de S-ro Marcel CUENE, varma defendanto de la internacia lingvo.

En la maja bulteno, S-ro FLEURY, kontraŭulo, skribis jenan aserton : "Miascie, ĝis nun la internacia lingvo estas la franca." Krome, li riproĉis al ŝtatoficisto utiligi franclingvan revuon por instigi la sendon de leteroj rekomendantaj artefaritan lingvon. Ankaŭ, li starigis jenan demandon respondon : "Kiel do okazas la internaciaj renkontiĝoj? Por tio oni atendis nek esperanton, nek la aliajn artefaritajn lingvojn".

Al tiu lasta punkto, S-ro CUENÉ respondis :
"Kiel okazas la internaciaj renkontiĝoj?
- Per aŭskultiloj ĉe la oreloj por la aŭskultantoj kaj antaŭpreparitaj paroladoj, kies teksto plej ofte estas transdonata al la interpretistoj por eviti la erarojn...
Elirintaj el la kunvenejo, ĉiuj fariĝas karpe mutaj : la aŭskultiloj ne plu estas utilaj, kaj la interpretistoj estas for...
Ne estas same koncerne la internaciajn esperanto-kongresojn : la paroladoj estas rekte aŭskultataj, senpere, kaj per neniu ajn interpretado krom sia. Neniu baro staras, ĉu en la kongresaj koridoroj, ĉu sur la strato, kiu baro povus malebligi al la partoprenantoj interŝanĝi siajn pensojn kaj opiniojn aŭ paroli kun la ĉarma duaranga kunaŭskultintino, kies hararanĝon neniu kasko malordigis.

Ankaŭ partoprenis la debaton multaj defendantoj de esperanto, i.a. : niaj membroj BONVOISIN k GILOTEAUX.

N.D.L.R. Verŝajne, S-ro FLEURY konsideras sia biblio la verkon de RIVAROL : "Parolado pri Universaleco de la Franca Lingvo". Tamen, se en la 17-a kaj 18-a jc. la franca okupis unuarangan lokon en Eŭropo - ĉefe en la reĝaj kortegoj kaj nobelaraj salonoj, la situacio jam ŝanĝiĝis, kaj la influo de la angla sur nian nacian lingvon akre sentiĝas. Ne nur sur la kampoj de sporto, tekniko, komerco, sed eĉ en la ĉiutaga vivo : frangla. Eĉ aperis en nia lando libro speciale verkita por atentigi la ĝeneralan opiniantaron pri la ŝvebanta minaco de tiu angligo de la franca lingvo.

"CHEZ NOUS" (Semajno-gazeto de la Familio) 1-7 SEPTEMBRO 1966

### Esperantistaj esperoj.

La Esperantistoj firme esperas, ke ilia internacia lingvo daŭre disvastiĝos. Ili mencias, ke ĝis nun estis publikigitaj pli ol 10.000 verkoj k 150 periodaĵoj en esperanto, aperantaj en la tuta mondo. Tamen, nova esperanto-lernolibro bazita laŭ la rekta metodo, kun bildoj, karikaturoj, kaj desegnitaj bendoj rikoltis ĝis nun nur malgrandan sukceson.

## JUNULARA KAMPANJO

La 58-a nacia kongreso de U.F.E. kunveninta en Agen unuanime aprobis la rezolucion decidantan la organizon por la periodo 1966-67 de "Junulara Kampanujo".

Ni alvokas ĉiujn federacianojn streĉi sian forton por la plivastigo de JEFO. La respondeculo, S-ro COURTOIS jam sendis cirkuleron al ĉiuj gejunuloj por plifaciligi la kontaktojn kun la grupoj kaj ricevi de ili efikan helpon, financan kaj moralan. Ni nepre kalkulas pri vian kunlaboro tiuflanke por ankaŭ faciligi la alproksimiĝon kun la junularaj movadoj, lokaj kaj regionaj. Tiu laboro estu en kunordigo kun la sekretariato de U.F.E., 34, rue de Chabrol, PARIS (X°).

### Alvoko al la kreskanta generacio!

Ĉar S-ro Alain OUTREMAN soldatiĝos dum la venontaj monatoj, la Federacio Sekcio "Junuloj" denove troviĝas sen kapo. Tial la estraro direktas alvokon al ĉiuj junaj legantoj de NORDA GAZETO : por trovi inter ili la kernon de agemaj junuloj, kiuj prenos sur sin la taskon organizi - kaj poste vivigi - la sekcion.

La interesataj aktivemuloj sin konigu, antaŭ la renkontiĝo en VALENCIENNES, per kelkaj vortoj sendotaj al la Prezidanto :

- S-ro Georges ODENT, 17, rue des Bouvreuils, 62 - ARRAS;

aŭ al la Ĝenerala Sekretario :

- S-ro Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62 - CALAIS.

### EKSPOZICIO "CONNAISSANCE DE L'ESPÉRANTO"
ĉe "Institut Pédagogique National", Paris.

Tiu ekspozicio, sub la oficiala patronado de S-roj FOUCHET, Ministro pri Edukado, ROCHE, akademiestro, FRECHET, de la Scienca Akademio franca, k aliaj, daŭros ĝis la 29-a de oktobro. U.F.E. havas la permeson utiligi la materialon kaj sendigi ĝin al ĉiuj grupoj, kie troviĝas "Bureau Régional ou local de Documentation Pédagogique". Interesatoj bonvolu sin turni rekte al la Sekretariato Chabrol. La fina decido dependas de la direktoro de la loka aŭ regiona poreduka oficejo. Sekve, bv. unue klopodi ĉe la koncerna instanco.

### ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN BRUSELO :

Semajnofino de Valonia Federacio de la Naturamikoj. 22-23 OKT 66.
Sub aŭspicio de SAT-Amikaro.

Kongresejo : Naturamika Domo "Fraternité", 37, rue de l'Argonne, BRUSELO (je 200 m. de stacidomo "Midi").

ĈIUJ ESPERANTISTOJ ESTOS BONVENAJ!

Inter la programeroj : Sabate : Vizito de "Planetariumo" aŭ de "Atiomiumo".
Kultura Vespero - Balo.
Dimanĉe: Ekskurso al Sonia-Arbaro.
Komuna Tagmanĝo.

La detalan programon havigas : S-ro Van AELST, 56, Bd Lambert, BRUXELLES 7.

---

Bulteno ofsete presita de Centre National Espéranto-Office,
9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45 - ORLÉANS.

Le Gérant responsable :
Lucien BOURGOIS, 25, rue Gambetta, 62 - NOYELLES-GODAULT.